

OOMOTO

MONATA ORGANO DE OOMOTO-MOVADO



Jaro VIII


JANUARO

N-ro 1

N-ro 77

OOMOTO-PROPAGANDA OFICEJO

KAMEOKA JAPANUJO



Philipp Thalmeyer
Möbel- und Bauschreinerei
DORFEN (Obb.)



Simbolo de Japanujo — Monto Huji.

Gebrüder Thalmeyer
Zürich



S-ro Onisabro Deguçi en la uniformo de Junulara Ligo.
Li estas la estro de Oomoto-Junulara Ligo.



Internacia Rondeto de Religiuloj en Mukdeno, Manĉurio.

De maldekstre : en la unua vico — S-ro M. Gotoo (japano) ; S-ro Haboroboskij (ruso), -Profesoro de Tohoku-Universitato ; S-ro Hidemaru Deguci ; S-ro Chang Têchang (ĥino), Estro de la Mahometa templo ; S-ino H. Katoo (japanino) ; en la dua vico — S-ro Yang (juna ĥino) ; S-ro Poroĉinof, Estró de Sibera Asocio (rusa mahometano) ; S-ro ĉefleŭtenanto Hirasa (japano) ; S-ro interpretisto Kurimoto (japano).



Karta-ludo de japanaj knabinoj.

Leganto legas la legkartojn, sur kiuj estas skribite po unu tuta poemo, kaj ludantoj konkuras pli rapide preni la koincidan el la ludkartoj, kiuj estas dismetitaj antaŭ la ludantoj. Tio ĉi estas ludo de P' Novjaro.

O O M O T O

MONATA ORGAÑO DE OOMOTO-MOVADO

JARO VIII Nro. 1 (77)

JANUARO 1932

Abonprezo: Por jaro 2.40 Jenoj, 5.00 Sv. Fr. aŭ 24 internaciaj respondkuponoj aŭ ĉiu egalvaloro. Specimeno senpaga.

La pagojn sendu per poŝtmandato, respondkuponoj, al lokaj reprezentantoj aŭ rekte al la administracio. Klare skribu vian adreson!

Adreso de la Redakcio kaj Administracio:

Oomoto-Propaganda Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Moto de Oomoto

Dio estas spirito enhavata en ĉio de la universo, kaj Homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj Homo, tie ekestigas senlima forto kaj aŭtoritateco.

Kvar Principoj de Oomoto

PURECO (En animo kaj korpo)

UNUECO (Harmonio inter klasoj altaj kaj malaltaj)

OPTIMISMO (Plena trankvileco en Dia arango)

PROGRESEMECO (Vojo de socia plibonigo)

Tri Klerig-motoj de Oomoto

Konsideru la korpon de Dio, observante la veran aspekton de la universo.

Konsideru la forton de Dio, konstatante la plenan senerarecon de la movado de ĉio en la universo.

Konsideru la animon de Dio, konceptante la koron (animon) de la vivaĵoj.

« **Konturo de Oomoto** », 15.5x11.5 cm., 20 paĝoj, 8 bildoj.
Tiuj, kiuj volas koni trajtojn de Oomoto, povas ĝin postuli al:
Oomoto-Propaganda Oficejo.

OOMOTO-MOVADO

Deveno kaj Celo. « Oomoto » signifas *Fundamenton* de la mondo. La Fundamenta Dio, kiu estas Kreinto de la universo, sin aperigis en la sankta loko Ajabe, 1892, kaj faris gravan deklaron, ke Li praktikos grandan kaj elfundan revolucion de la tri mondoj: Dia, spirita kaj reala. Lia idealo estas ja en tio, ke ĉielregno plena je ĝojo, feliĉo kaj paco sin malfermu sur la tuta tero. Oomoto estas la movado, kiu sinofere marŝadas al efektivigo de ĉi tiu deklaro de Fundamenta Dio. Kaj Oomotanoj servadas al Dia Entrepreno, kun firma kredo, ke la de Dio celita paradizo nepre realiĝos sur la tero.

Sinjoro Onisabro Deguĉi. Nun, la mondo ĝisiris al la fino, konsiderate de ĉiuflanko. Socio, nacio kaj ankaŭ individuo sin baraktas en maltrankvilo kaj malpacienĉemo. La vera potenco, kiu kapablas trakti ĉi tiun malfacilaĵon, estas ja nur Oomoto. Ĉar, jen ĝi posedas S-ron O. D., kiel anstataŭanton de Dio, entenantan en si Dian aŭtoritatecon senfinan. Vere, Li ja estas granda Dio-Homo.

En la daŭro de 40 jaroj, la movado prosperiĝis kun granda rapideco: oni havas **Eŭropan Centran Oficejon** en Parizo, **Brazilan Centran Oficejon** en San Paŭlo, kaj jam pli ol 1.000 filiojn en la tuta mondo.

E.C.O. eldonadas ĉiumonate la organon « **Oomoto Internacia** » kaj entreprenas konstrui **Domon de Homamo**, kiu estas forte subtenata de multaj eŭropanoj; kaj B.C.O. jam komencis konstrui **Universalan Komunan Preĝejon**, kiun oferis al Oomoto-Dio ĉiugentaj tieaj loĝantoj.

Oomoto koaliciis kun Tao Juan kaj Ruĝ-svasatika Asocio, kiuj estas novreligiaj movadoj en Ĥinuĵo, kaj kun kelkaj novspiritaj movadoj en Eŭropo; kaj kunlaboras kun ili por la komuna celo.

Ĉe la Jarkomenco

Akceptante la alvenon de la nova, 1932a jaro, ni kore deziras al niaj tutmondaj legantoj grandfeliĉon kaj esperas sincere, ke plej bona sano estos kun ili.

La Manĉuria Afero, kiu daŭris de la lastaj kelkaj monatoj de la ĵus pasinta jaro ne vidis ankoraŭ sian finon kaj ĝi transportiĝis en la novan jaron, kio estas je nia granda bedaŭro. La mondo ekhavis la nunan jaron en eksterordinara streĉeco, direktante sian rigardon al la Manĉuria frostkamparo, kiel ankaŭ al la diplomatia scenejo en Genevo. Ĝuste Japanujo estas metita en la mezo de l' mondaj atento kaj intereso. Ĉe la malfermigo de tiu ĉi jaro ni ja scias, kion niaj legantoj volas aŭdi de ni. Ni do priparolos iomete pri tio, kio estas atendata.

Ni estas japanoj kaj Oomotanoj; ne ĉiuj japanoj tamen estas Oomoto-kamaradoj kompreneble. Eĉ, la japana, ĝenerala publiko, precipe la registaro premadis Oomoton, kiu devis travivadi maldolĉaĵojn dum granda jarserio. Pri tiu ĉi historio jam bone scias ĉiuj niaj legantoj, esceptante kelkajn, plej novajn el ili. Kaj eĉ en la aktualeco oni ne povas diri, ke la publiko estas tre favora al ĝi. Oni malŝatas Dion. Oni ne komprenas Dion. Ne utilas jam diri, ke la jenaj opinioj estas de nia flanko, kiel de Oomoto-anoj, kiuj troviĝas en la dirita cirkonstanco.

Kolonia politiko estas unu el la gravaj subjektoj en ŝtata administrado. Multaj ŝtatoj senescepte uzis armean potencon por solvi la gravan problemon; kaj post la sukceso ili trakolorigis vastajn terpartojn per siaj samaj koloroj. Japanujo ankaŭ gajnis la rajtojn en parto de Manĉurio depost la milito dum 1904—5. Ni ne volas diskuti tie ĉi pri tio, ĉu la «rimedo» estas taŭga aŭ ne. Temas nur, ke ja tia estis la ordinara, ĝis nun senescepte aplikita rimedo por koloniado; sufiĉas nur renovigi la memoron, ke tra la mondo militalismo estis aŭ estas la fundamento de ŝtadadministrado. Kelkiuj ŝtatoj eĉ uzis la rimedon ne pro neprega neceseco. Tion oni povas diri, konstatante tiujn aŭ aliajn koloniajn terpartojn, kiuj estas

lastaj nekulturitaj kaj en kiuj granda riĉaĵfonto neniam ankoraŭ vidas sunlumon kaj troviĝas nur maldensa loĝantaro. La cirkonstanco de Japanujo en Manĉurio estas alia. Tio prenas sian bazon sur nepra neceseco kaj la vivo de la nacio rekte dependas de tieaj rajtoj. Konsiderante la realan cirkonstancon de Japanujo, kiu estas malpermesita de Usono tien sendi la popolon kaj mem suferadas pro terura plimultiĝo de la loĝantaro, kaj ankaŭ de sur la vidpunkto de l' problemoj ekonomia, nutraĵa ktp. la etendo de tiu ĉi insullando en Manĉurion estas sufiĉege rezonebla eĉ de la flanko de l' internacia moralo en la mondo sub militismo. Nome, pligrandaj kaj plifortaj ŝtatoj en la mondo ne havas la rezonon diri sintrudan parolon pri la agado de Japanujo, kiu en efektiveco, ne faras pli ol minimumon de neceso, komparante tion kun siaj propraj kondutoj en aliaj landoj.

'Vere pro tiu 'neceseco' Japanujo entuziasme kulturis kaj civilizis Manĉurion, lokante grandegan kapitalon (250 milionoj da pundoj). La nunaj prospero kaj bonordo estas la rekompenco de la Japana klopodo en la daŭro de kelkdek jaroj. Ke la mondo grandprofitas de tio, tion neniu neas krom intencaj paradoksuloj. Kaj se la nuna malfeliĉa Afero okazis pro tio, ke Ĥinujo neglektis la traktatojn kaj faris diversajn malmoralajn kontraŭ japanoj kaj japanaj aferoj kun la celo forigi la japanan influon, la kontraŭrimedo de Japanujo estas tiam neevitebla, ni pensas. Armeo estas tia, kian oni povas movi, kiam la aferstato devigas sin-defendi.

Tamen la japanoj devas ĉe tio sin introspekti profunde. Estas fakto ke la japanaj, sinsekvaj politikistoj devize preferis kaj sekvis la metodon de edifado en la Manĉuria administrado, sed oni ne povas diri, ke tie ne ekzistis malvirtaj kondutoj de japanaj rajto- kaj profito-ĉasantoj. Tio atestas, ke en Japanujo mankis politikisto, industriisto aŭ edukisto de grandioza karaktero kiel Dio; en tiu ĉi rilato Japanujo devas honti. Se niaj generaciaj politikistoj estus sciintaj praktiki politikon per vera bona mo kaj laŭ la Koro de Dio, kiel nia Oomoto-insistadas, ne estiĝus eĉ ĝermo de la nuna malfeliĉaĵo.

En tiu ĉi konsidero grandiozaj devas esti la faroj de Majstro Onisabro Deguĉi, kiu, jam en la jaro 1924 a, dum kaŭcia elkarceriĝo en Oomoto-Afero, eniris kun nur tri adeptoj en Mongolujon por propagandi la Dian Instruon kaj savi la popolon spirite kaj korpe... En la sama jaro li fondis la Ligon de Religioj en Peking kaj reveninte en Japanujon post duonjaro da migrado, li fondis Universala Homama Asocio'n. Nur iom pliposte li kunigis Oomoton (U.H.A.) kaj Tao-Juan (Rug-Svasatika Asocio), la potenca, nova spirita movado en Ĥinujo kaj klopodis por spiritaj akordigo kaj unuigo de ambaŭ popoloj.

Povus okazi, ke la legantoj demandos nin, dirante :
— Se Oomoto kaj U.H.A. en Japanujo kaj Tao-Juan kaj R.S.A. en Ĥinujo estas tiel potencaj movadoj, kial ili ne povis malhelpi antaŭe la nunan malpacigon inter ambaŭ ŝtatoj? —

Estante spiritaj movadoj, nek unu, nek la alia havas, en nuna tempo, praktikajn, politikajn aŭtoritatojn; ankaŭ en la aktualeco la tradiciaj ideoj kaj procedoj pliforte regas super la ŝtatoj; pro tio la afero venis al la malĝojiga, sed natura rezultato: batalo. Multe bedaŭrinde tio estis neevitebla fatalo, oni povus diri. Tamen fakte en malantaŭo de tiu ĉi interbatalo inter ambaŭ ŝtatoj, forte sin movas la tendenco de konkordo kaj interligiĝo de la popoloj per la laborado de la du movadoj. Ĝis nun Oomoto (U.H.A.) kaj Tao-Juan (R.S.A.) servis tute super la naciĉo, je protektado kaj savado de l' rifugantoj, flegado kaj konsolado de vunditaj aŭ malsanaj soldatoj, spiritservo de mortintaj soldatoj ktp. kaj ili ricevas grandajn dankojn de la publiko. Plurajn fojojn partaj interpuŝoj estis efektive malhelpitaj de iliaj klopodoj. Pro tiuj ĉi belaj agoj multaj blankpartiaj rusoj venis amase al U.H.A. kaj en Novembro de la lasta jaro fondigis en Mukdeno la Centra Oficejo de la Siberia Ligo de U.H.A. Tiel kelkmiloj da freŝaj batalantoj kolektigis sub la standardon de Universala Homamo. Estas ĝenerale dirate en la batallinioj, ke la insigno aŭ marko de U.H.A. kaj R.S.A. estas pli efikaj ol la pasatestilo de

la registaroj. Per ĉio ĉi tio oni povus konvinkiĝi, kun kiomgrada konfido ambaŭ movadoj estas traktataj tie en Manĉurio. Oni ne havas tian ekzemplon en la historio de konfliktoj aŭ bataloj en la mondo. Kaj la laboro de la Asocioj ja dependas de la estonteco. Kiu kuraĝus aserti, ke ne fondiĝos iu nova, ideala organizacio en Manĉurio per la grandspirito de ambaŭ movadoj?!

Nun ni observu la radikan kaŭzon de la malpacigo inter Japanujo kaj Ĥinujo. Unu insistas la rajton de la traktatoj; la alia volas tion rifuzi kaj insistas la rajton de politiko. Tio estas certe la fundamento de la afero, ni vidas.

De nia flanko, la homaro havas nur devon kaj ne rajton! Tion ĉi oni facile komprenus, se oni vere vidus Dion, se oni profunde mezurus la Koron de Dio. Ĉiuj abomenaj malpacoj kaj konfliktoj en la mondo okazas ja pro tiu ĉi « rajto ». La homaro redonu ĝin al la mano de Dio, anstataŭ aroge kaj nemerite ĝin insistadi. Ne plu ekzistus ekskluziva okupo de tero, nek monopolo de naturaj produktaĵoj. Sufiĉas por la homaro intenci nur feliĉigon kaj profitigon de la frataro kaj nur plenumi sian devon, plejgrade demonstrante la proprajn, de Dio aldonitajn karakterizaĵojn de raso, gento kaj nacio. Tie la paradizo ne povus ne malfermiĝi. La komunistoj krias egalecon nur sur la vidpunkto de klaso. La samon ni insistas ankaŭ rilate la ŝtatojn, sed farante ĉiam Dion la fundamento. (Komprenu, ke nia 'egaleco' havas iom alian enhavon ol tiu de la komunistoj.) Ili uzas konflikton kaj batalon por sia celo; ni volas nin orienti per amo, harmonio kaj interhelpo por tio.

Oni ne povas kredi tamen, ke tia bela surtera Elizeo venos facile. La Homaro devus antaŭ tio travivi grandajn provojn de Dio. Vere tion proklamis la Tera Prapatro, aperinta en la mondon pere de Oomoto kaj ja tion ni avertadas al la frataro de la mondo. Ni pensas, ke la Diaj provoj komenciĝis supraĵe ĉe la okazo de la Manĉuria Afero. Ĉiuj ŝtatoj kaj nacioj havas la sorton trasperti tion egale kaj senescepte kaj la mondo devus

previdi sufiĉe da oferoj. Post ĉio ni ne hayas rimedon ol lasi al la justega juĝo de Dio.

« La lumo el la Oriento »... Eĉ la okcidentanoj ne neas, kiel ŝajnas, tiun ĉi frazon, kiu estis kriita de la antikva sanktulo kaj tradicie ripetdirata. La venonta, nova mondo devas esti tiu de glora, spirita kulturo. La raketo de la spirita civilizacio estas alten levita de la mano de Majstro O. Deguĉi. Necese estas por la homaro sin prepari akcepti la novan Gvidanton super ĉiu partieco.

Kiel la reala fakto de nuneco, la Ligo de Nacioj ĉiel prememas kaj detenemas Japanujon. Estas interesa fenomeno. Legantoj! ĉu vi scias, ke niaj avoj kaj patroj rifuzis la Eŭrop-Amerikan civilizacion, kiam ĝi, antaŭ sesdek jaroj, komencis veni en nian landon kaj ili tre prosperigis la ideon forigi eksterlandaĵojn? Sed la influo de tempo venkis tion; nia lando akceptis kaj aplikis ĉiujn maŝinojn kaj manierojn de Eŭropo kaj Ameriko kaj nun ĝi eldigestis kaj alproprigis al si ilin. En tio, ke la Ligo de Nacioj emas nevoli akcepti Japanujon — se tio estu pro politikaj kaŭzoj — en la tempo, kiam la spirita kulturo el la lulilo de sunleviĝa lando komencis transpasi la montaron de Kvingan, ni vidas la inverson de tio, kion niaj patroj faris. Tion ĉi ankaŭ solvos la influo de tempo.

Ĝuste nun la aŭroro de la spirita renesanco alproksimiĝis. Ĝi venos en la mondon kun la potenco de furiozaj ondegoj kaj forpelos el sur la tero ombron de mallumo.

Niaj estimataj kaj karaj samideanoj en la kvin kontinentoj! ni, kiuj plifruie eksciis Dion kaj Lian Volon, firme tenu la manojn, kuraĝe marŝadu antaŭen, ĉe ĉiu malfacilaĵo agante juste kiel la infanoj de Dio kaj sindone laboradu por starigi Lian Regnon surtere eĉ unu tagon pli frue...

Per tio ni promesu la novan jaron. Fratoj! donu la manon!

(H. Otaka)

SANKTA SKRIBO

Revelacio de la Granda Dio per la Fondintino Nao Deguči.

Skribita la 10-an de Aŭgusto, 1904.

Ĉu en la ĉielo, ĉu sur la tero, ĉion Mi unuigos ; kaj ekvilibros la tutan mondon en ĝusta simetrio : ĉiun el la homaro Mi feliĉigos kaj neniun traktos senutila kaj vana.

Kiam rizplantaĵoj elkreskos el la semoj, Mi elirigos lin kaj en sezono de falĉado Mi revenigos lin kun sukceso. Mi juĝas kaj esploras la originalajn semojn. Bonaj semoj donos belajn fruktojn. Havante bonan originon, homo povas fari kian ajn aferon.

Skribita la 14-an de Aprilo, 1905.

Intencante plenumi la duan malfermon de la ĉiela pordo, Mi, gardodio de la tero, altiros al Mi homojn, kiujn Mi jam preparis en pratempo, precipe, por tiu ĉi entrepreno, kaj Mi ilin laborigos en respektivaj servoj.

La nunan servadon ne povos plenumi tiu, kiu ne havas spiritan rilaton kun Mi. En estonto, mono kolektiĝos en Oomoto, kiel pluvo en citerno, kaj multaj homoj venos al Oomoto kun mono, petante servon de ĝi, sed oni ne rajtas uzi eĉ unu centimon de la mono, kiun alportos la homoj senrilataj kun Oomoto, eĉ per tre dolĉaj pretekstoj.

Ilian monon, venantan grandsume, oni ne ricevu antaŭ peto al Dia juĝo. Vi, Oomot'anoj, nun ne rajtas avare serĉi monon. Toleru nuntempe kaj servu, manĝante eĉ arbofoliojn aŭ herbaĵojn. Kiam Mi konstatos vian sincerecon, Mi gardos vin, por ke vi povu plenumi vian devon, ne zorgante pri mono. Nun estas la plej grava kaj malfacila tempo, kiun vi devas trapasi per sincereco kaj tolero. Neniam uzu por dia afero monon, peke amasitan.



La Ekspozicio de Belartaĵoj de Tutjapanaj Liceaninoj por Internacia Kunfratiĝo

(Projekto de «Zinrui Aizen Sinbun», nacia organo de U.H.A. en Tokio)

Multaj el niaj legantoj scias, ke Universala Homama Asocio havas sian nacilingvan, dekadan organon «Zinrui Aizen Sinbun», eldonatan en Tokio. Tiu ĵurnalo lastatempe akiris pure 300.000 legantojn kaj ĝi fariĝis la tria laŭ la eldonnombro el ĉiuj 10.130 ĵurnaloj en la lando.

Kun ĝojo ni prezentas al niaj eksterlandaj samideanoj novan projekton kun la titolo: La Ekspozicio de Belartaĵoj de Tutjapanaj Liceaninoj por Internacia Kunfratiĝo, kiun entreprenis la supre nomita ĵurnalo kun subtenoj de la Orienta Centra Oficejo kaj Eŭropa Centra

Oficejo de U.H.A kaj Esperanto-Propaganda Asocio.

Ĝia enhavo estas jena :

Ni alvokas ĉiujn knabinajn liceojn de Japanujo, postulante ilin alsendi verkojn de japanaj pentraĵoj kaj japanaj kaligrafiaĵoj (skribitaj per harkrajono kaj nigra inko) faritaj de la lernantinoj. El la verkoj tiel kolektitaj, pluraj komitatanoj reprezentantaj eminentajn artistojn de nia lando, elektos plej taŭgajn bildojn kaj oni elmontrados ilin al la publiko en la salono de l' fama ĉiovendejo en Tokio en marto de tiu ĉi jaro.

Tia estas jam ofte intencita, se tio estas tuto. Tia entrepreno estas tute triviala. Sed la nia havas ankoraŭ gravan parton, pro kiu ni iom pretendas. Nome, post la fino de l' ekspozicio, ni sendos kaj donacos tiujn elektitajn verkojn al la tutmondaj lernejoj, grupoj, familioj kaj personoj, kiuj deziras ilin havi, en konvenaj manieroj pere de la Eŭropa Centra Oficejo de U.H.A. en Parizo kaj ĝiaj filioj kaj propagandistoj troviĝantaj diversloke en la mondo. Ni ja deziras per tio plifortigi amon kaj amikecon inter nacioj kaj gentoj.

Tiu ĉi lasta parto de la entrepreno estas certe fiero propre de nia ĵurnalo, kiun rajtas ĝui neniu pligranda nacia ĵurnalo! kaj ni pensas ankaŭ, ke tia entrepreno estas efektivigebla mondamplekse nur per tia organizacio, kiu havas diversnaciajn samideanojn, kiuj subtenas kaj helpas sincere. Tiu ĉi projekto estas sendube malfacilega sen Esperanto.

Nu, tiuj artaĵoj, kiuj venas en la manojn de l' tutmondaj kunfratoj, estas, por tiel diri, apostoloj senditaj al la respektivaj landoj, lernejoj, grupoj, hejmoj kaj personoj el la pacama Japanlando kaj precipe el nia U.H.A., kies devizo estas nur: Universala Homamo kaj Internacia Akordigo.

Ni ne dubas ke la ricevantoj sin interesos pli malpli per la artaĵoj ellaboritaj laŭ japanpropra por ili verŝajne

kurioza maniero kaj eksciante parton de niaj pejzaĝoj, moroj, kutimoj, ktp. kaj ni kredas ke ĉiuj niaj legantoj aprobos nian bondeziran entreprenon, samtempe ekhavantante simpation kun nia entuziasmo por internaciaj kunfratiĝo kaj interkompreno.

En la eventuala intersanĝo de amikeco inter ili kaj ni, — ricevantoj kaj donacintoj aŭ *verkintinoj*, ni konsilas uzi, kiomeble, Esperanton, kiel interkomprenigilon. Ne-esperantistaj ricevantoj eklernos Esperanton, ne-esperantistaj japanaj knabinoj ankaŭ same; kaj la publiko, kiu konas pri nia entrepreno, konstatos la praktikecon kaj utilecon de nia lingvo. Se tio povos servi en certa grado por antaŭenpuŝi la Esperanto-movadon en nia lando kaj ankaŭ en diversaj landoj kaj distriktoj de la ricevantoj, ni ja estos plene rekompencitaj.

En la nuna tempo 80 knabinlernejoj en diversaj provincoj de la lando jam aliĝis al nia projekto kaj la verkoj alvenas al ni tagon post tago.

Niaj legantoj kompreneble rajtas peti la donacon, sed vi ne forgesu diskonigi pri tiu ĉi nia projekto al viaj proksimuloj precipe ne-esperantistaj kaj propagandi Esperanton al ili kaj ilin Esperantistigi.

Oni povas komuniki sian deziron rekte al nia Oomoto-Propaganda Oficejo en Kameoka aŭ al la Eŭropa Centra Oficejo en Parizo, kiel ankaŭ al niaj lokaj reprezentantoj aŭ propagandistoj, al kiuj ni petas tie ĉi, ke ili bonvolu aranĝi la aferon.

(Eble oni elektos ĉirkaŭ 300 bildojn por donaci. La nombro ne estas tiel granda. Tial plifruaj postulantoj gajnos.)

Sub la Standardo de Homamo

Unuiĝo de la Aziaj Gentoj

Fondo de Siberia Homama Asocio

Kiel ni jam kelkfoje raportis, la energia kaj fruktodona laborado de Universala Homama Asocio por diversaj flankoj estas ja celo de granda admiro de ĉiugentanoj en Manĉurio.

La 2an, Novembro de la lasta jaro, Kolonelo S-ro Porocinof (ruso), Prezidanto de la Siberia Asocio vizitis S-ron Hidemaru Deguĉi, Estro de la Orienta Centro de UHA, kiu nun restas en Mukdeno, por interkonsiliĝi pri fondo de la Siberia Homama Asocio. Li ricevis afablan permeson de S-ro Hidemaru pri l' fondo kaj do senprokraste ekkomencis varbi samideanojn, alvokante al la mondo per presajoj japan- kaj ruslingvaj, kun subskriboj de si mem, teologia doktoro S-ro Paŭrofskij, arĥitekto S-ro Karcanof kaj kapitano S-ro Pesikof (ĉiuj estas rusoj).

La Siberia Homama Asocio celas: fondi solidan unuiĝon de ĉiuj popoloj en la azia kontinento: japano, ruso, ĥino, koreo, mongolo ktp., super la naciecoj, religioj, k. a., kaj venigi verajn feliĉon kaj pacon al Azio, per instruo de la giganta Dio-Homo en spirita mondo, kiu, oni kredas, certe aperos en Oriento.

Ĉi sube ni tradukos el la ruslingvo la leteron, kiun la iniciatoroj de SHA skribis al S-ro Hidemaru Deguĉi.

Altestimata S-ro Hidemaru Deguĉi, Estro de la Orienta Centro de UHA.

La kunsido, kiun ni havis kun vi kaj la reprezentantoj de aliaj religioj, en la 2a de Novembro, al ni donis tre bonegan impreson; tion al vi sciigi estas nia morala devo, ni pensas. Ĝi elvekis al la kunvenintoj profundan memkonscion religiecan por batalado kontraŭ la ateistoj, kiuj projektas bestigi la koron de popoloj, per frakaso de la religio. Ni ne ŝparas admiron al vi precipe por la de vi efektivigata entrepreno kontraŭ tiaj artifikaj ateistoj, ĉar ĝi ja estas plej trafa movado por la spirita savado de ĉiuj gentanoj en orienta Azio, kaj ĝuste en la nuna momento senekzemple gravega. De pratempo ĉiuj gentoj en orienta Azio vivadas sur tre malsamaj fundamentoj kaj sin fermas en specialaj malnovaj kutimoj pro

siaj propraj religioj. Ilia unuiĝo estas ebla ja nur per la ideo de humaneca justeco elsprucanta el la homa spirito, sed per nenio alia. Se oni prenos ĉi tiun rimedon, ni ne dubas, ke oni povos kunligi ĉiujgentanojn, kiuj estas premataj de ateistoj dum longa tempo, kaj ilin aligi al UHA, iniciatita de via bopatro, S-ro Onisabro Deguĉi, kio ankaŭ etendigas la laboron de UHA ĉiuloken en la vastega azia kontinento. Tiam, unuaj volontaj aliĝontoj al UHA, ni pensas, estos la popoloj de Mongolujo kaj Siberio kaj multaj mahometanoj, kiuj disloĝas en Ĥinujo kaj Rusujo. Ili estas submetita sub la senĉesa kaj peza premado, en spirita kaj materia flankoj, de ateistoj kaj pro tio jam perdis religikredon kaj eĉ homan rajton. Kaj nun ili, atendante kun forta deziro grandan Dihomon de spirita mondo, aperonta el la oriento, firme kredas alvenon de benata tago, kiam ili estos plene savitaj, liberigitaj de diversaj malfacilaĵoj.

Ili jam havas neniom da konfido al siaj politikaj regantoj. De tio ankaŭ devenis ilia deziro, kuniĝi, per aliĝo al UHA, kun la tuta anaro de Azio, sub unu sola Granda Dio kaj forigi per vigla kontraŭbatalado precipe kontraŭ ateistoj, la diversajn malhelpaĵojn, kiuj ĉiam baras la spiritan interfratiĝon inter ĉiujgentanoj. Ĉar la regantoj premas la manon de politikisto-friponoj kaj malordigas la socion per senprudenta politiko; ili lasas al ateistoj bonan okazon furiozi, suferigas sian popolon sub la persekuto de socialistoj kaj despli vigligas konflikton inter la sociklasoj. Kiuj enfaligis la socion en tian grandan tumulton spiritan kaj materian, estas ja neniu alia, ol ili, regantoj mem.

Konsiderante tion, ni nun kredas, ke religia movado kun la standardo de UHA kapablas doni plej grandan feliĉon al tiel suferantaj aziaj gentoj kaj aliflanke introspektigi kaj konverti degenerintajn regantojn. Kaj tiu sekvo fariĝos, ke ni facile povos detrui la ateismon, restarigi ne nur la ordon de l' orientaj nacioj, sed ankaŭ tiun de nacioj sur la marbordo de Pacifika Oceano, kaj ankaŭ ŝanĝi elfunde la delikatan cirkonstancon de la ekstrema oriento, kiu nun al si fiksas grandan atenton de l' tuta mondo. Alivorte dirite, tio estos ja brilanta sukceso de la japanoj. Ni kredas, ke kreskiĝo de la potenco de via Japanujo ne nur kvietigos ŝanceliĝeman politikon

de orienta Azio, sed ankaŭ decidis gravan sorton de okcidenta Azio.

Ni do deziras al vi, ke vi bonvolu kunigi al UHA nian novan Siberian Homaman Asocion, kaj samtempe vin petas energie, ke vi utiligu nin por la pacmovado de l' oriento kaj tutmondo kaj ankaŭ por plenumado de via granda misio alfidita de Dio.

Oni devas, ni opinias, fondi filiojn de UHA en ĉiu loko de Ĥinujo, kie loĝas rifuge multaj blankrusaj ortodoksanoj kaj mahometanoj; kaj plie diversloke en Siberio oni bezonas meti ĉelajn organizojn, kiuj furioze kontraŭbatalos kontraŭ ateistoj. Por la filioj kaj la membroj la Centro de UHA presigu plurlingve sian statuon priskribantan detale pri la celo kaj efektiva laborado; kaj kun la celo de disvastigo de religikredo kaj de profundigo de la amikeco inter la membroj elektu specialajn predikistojn el ĉiuj religioj kaj sektoj kaj okazigu paroladon kaj kunsidon plurloke. Por eduki kaj vigligi la filiojn, la Centro, ni deziras, donu al ili specialajn instrukciojn, monatan kaj semajnan gazetojn, ĉiutagan ĵurnalon kaj aliajn propagandilojn, pere de komunikantoj, kiuj estos ofte sendataj de filioj al la Centro.

Por fini ĉi tiun skribon ni permesas nin fari al vi jenan ĵuron.

Tio estas, ke, se vi opinius, ke la Siberia Homama Asocio estas necesa, de religia vidpunkto, kaj permesos ĝin kunlabori kun UHA, ni, dum plej mallonga tempo, nepre fondos rusajn filiojn de UHA, en ĉiuj urboj de Ĥinujo, kie rifugas multaj rusoj. Ni prenos sur nin la tutan respondecon disvastigi la UHA-movadon en Siberio kaj Centra Azio, kie troviĝas multaj rusaj ortodoksanoj kaj mahometanoj.

Siberia Homama Asocio, premante la manon de Universala Homama Asocio, faros plejeblon por atingi al la komuna celo evoluigi plejalten la civilizacion kaj la ekonomion de la tuta homaro.

Tute Via,

Kolonelo, Porocinof

1stro de Siberia Asocio

Doktoro, Paŭrofskij

Arĥitekto, Karcanof

Kapitano, Pesikof

El 5-a Volumo de «La Rakonto el la Spirita Mondo»
de ONISABRO DEGUĈI

Ŝancelo de la Tera Akso

(I)

— ENKONDUKO — (Noto de la tradukinto)

La regado de Kunitokotaĉi-no-Mikoto, la Prapatra Dio de la Tero, estis devigata interrompiĝi pro intensa kontraŭstaro de malicaj dioj. Lia regado estis tro justega, tro serioza por povi akceptiĝi de ruzaj dioj. Konsiderante la ĝeneralan tendencon, la Granda Dio konsilis al la Tera Prapatro abdiki unu fojon, sed kun forta promeso, ke Li denove elvenigos lin en la mondon, kiam venos ĝusta tempo. Tiu ĉi obeis, cedis la reĝecon kaj travivis la vivon de ekzilo en la nordorienta angulo de la tero. De tiam nova reganto ekregis sur la tero.

Banko-daiĵin (aŭ Ŝionagahiko-no-Mikoto) estis la nomo de la nova reĝo aŭ pli ĝuste prezidanto, instalita laŭ la voloj de plimultaj dioj. Li estis denaske bona dio, sed poste, posedite de malbona spirito, agadis kontraŭ la Volo de Dio. La ĉefministra dio en la nova reĝimo estis Tokojohiko-no-Mikoto. Li estis plej malica: estis ja li, kiu forigis la Teran Prapatron kaj enmanigis la realan aŭtoritaton de mondregado.

Tokojohiko-no-Mikoto[★] metis Banko-daiĵin en la palacon de Edeno, mem enloĝis en la palacon de Jerusalemo kaj komencis sian arbitran regadon. Li sin nomis Jacuoo-daiĵin pro sia ofico.

Inter la subuloj-dioj de la Tera Prapatro estis Oni-

★ «... no-Mikoto» estas, por tiel diri, honora titolo, aldonata al dia nomo. Tio estas ofte donata eĉ al la nomo de malbona dio, se li apartenas al supera klaso. En tiu ĉi traduko ni forigos tion en multaj okazoj por pli mallongigi la nomojn.

take-hiko el la monto Taikoo-zan, Asahi kaj Takakura, kiuj havis magiajn povojn. Ili volis mistifiki kaj timigi la malicajn diojn uzante siajn supernaturajn povojn. Ili efektive laboradis en tiu ĉi celo, sed tio kompreneble ne estis laŭ la Volo de la Tera Prapatro, kiu estas justega, amega kaj kompatega. Ili agis tion nur memvole kaj pro sia simpla lojaleco al sia mastro.

Okazadis efektive strangaj fenomenoj en la palaco de Jacuoo-daijin (ĉefministro) en Jerusalemo. Multaj malicaj dioj embarasiĝis kaj timis pro tio. Jen la lasta okazaĵo :

Jacuoo-daijin havis filon nomatan Tokoharu-hiko kaj tiu ĉi havis grandajn kornojn sur la frunto. La edzino de la filo estis la filino de Banko-daijin kaj estis nomata Ŝioharu-hime ; la junaj geedzoj loĝis en la sama palaco kun la patro. Unu tagon alvenis al la palaco aliaj, falsaj geedzoj Tokoharu-hiko kaj Ŝioharu-hime kaj tiuj ĉi volis trapasi la pordegon kaj eniri. La gardistoj riproĉis ilin, kiuj siaflanke pretendis sin esti la vera paro. Okazis tumulto kaj batalo inter ili. Laŭ sciigo, Tokojo-hiko elvenis tien ĉi akompanate de siaj filo kaj bofilino kaj, ekvidinte la strangan scenon li miregis. Du paroj da geedzoj intermiksiĝis tiel ke oni ne povis distingi la verajn el la falsaj ; sed nur je la vestaĵoj oni apenaŭ trovis diferencon. Tokojo-hiko, panikofrapita pro la okazaĵo, sin kaŝis en la palacon, kunpreninte la verajn gefilojn.

Ĉapitro 210

Tokojo-hiko rapidis al sia ĉambro kaj jam reveninte preĝis la Dion de Tera Prapatro, sekrete en la koro, por esti liberigita de sinsekvaj, strangaj okazaĵoj. En la najbara ĉambro li ekaŭdis susursonon de vestaĵo ; jen elvenis tre altkreska dio, kiu estis — Oojaŝimahiko-no-Mikoto, ĉefangelo... Tokojo-hiko ege miris lin vidi

tie ĉi kaj sin sentis vaganta en la sonĝo. Post momento li ĵetis la duan rigardon en la vizagon de la enirinta dio kaj, kia miro tio estas! li trovis tiun personon jam ŝanĝinta en Onitake-hiko'n el la monto Taikoo-zan (Referencu en la enkonduko. — Tradukinto). Li estis tute konsternita kaj rigidis plu la rigardon sur lia vizaĝo, kiu subite prenis la trajtojn de sia propra filo! Kornoj elkreskis el lia frunto kaj li fariĝis perfekte samaspekta kun lia filo Tokoharu-hiko per sia tuta figuro. Ĉielo! tri Tokoharu-hiko'j fariĝis entute! Krioj aŭdiĝis des pli forte el ekstere; verŝajne oni ankoraŭ tumultis en la korto. Ekstreme konfuzita kaj perdinta jam ĝustan racion Tokojo-hiko elvenis al la vestiblo kiel somnambulo.

Tie ĉi *unu* Tokoharu-hiko bataladis kontraŭ liaj gardistoj. Tre baldaŭ aperis tie la aliaj du kaj ĉiuj tri 'filo'j komencis batali inter si, rampante kvarpiede. Ili pikadis per siaj kornoj kiel sovaĝaj bovoj kaj fine ili kune ekatakis Tokojo-hiko'n de tri flankoj.

En tiu ĉi momento oni ekaŭdis en la direkto de la Drako-Palaco grandegan eksplodon; nigra fumo amase sin levis ĉielen, okazis fajrego. En la Drako-Palaco loĝis Tokojo-hime, edzino de Tokojo-hiko. Kun plej granda peno ŝi elkuris el sub la fajro kaj alkuris al la palaco de sia edzo por peti savon. Ĝuste tiam, siaflanke, ŝia edzo ankaŭ estis en la mezo de dangerego, ĉirkaŭatakate de la tri monstraĵoj. Abrupte la dua eksplodo okazis en la profundo de la palaco: nigraj fummasoj elstariĝis, furiozaj fajroj envolvis la tutan palacon de Jerusalemo, kaj la tutaj konstruaĵoj baldaŭ disfalis kaj sin ŝanĝis en cindron.

La trietaĝa Ora-turo en la teritorio de l' Drako-Palaco komencis skuigi kaj mugi. Ĝi ekkreskis alten kaj kreskadis ĝis ĝia pinto atingis en nubojn. Jen la turpinto dividigis je du partoj, kiuj horizontale eketendigis kaj etendigadis senlime al la oriento kaj la okcidento. Unuvorte la Ora-Turo prenis la formon de giganta « T » kaj aspektis kvazaŭ grandega ponto kuŝis en la firma-

mento. Tion ĉi oni nomas «Ama-no-Ukihaŝi» (pendponto de ĉielo). Granda kvanto da blankaj nuboj elŝutiĝis el tiu ĉi ponto kaj en momento ĝi kovris la tutan ĉielon, apenaŭ kiam komencis neĝfali. Neĝo faladis en grandaj pecoj kaj kun terura forto. Post kelka tempo la tuta Jerusalemo troviĝis perfekte en neĝtavolo. Kontraŭ la turmentoj de fajro kaj neĝo, Tokoĵo-hiko eluzis ĉiujn energiojn kaj nur apenaŭ liberiginte de la dangereco forkuris al la direkto de Armenio kun sia edzino kaj nombraj subuloj.

Aliflanke, samtempe, en la teritorio de Edeno tremis grandega tertremo: la palaco de Banko-daiĵin dispusiĝis en pecojn, arboj mizere defosiĝis kaj plue fajro okazis el pluraj lokoj kaj fumo plene enfermis la spacon. Okaze venis ankaŭ furioza neĝblovo, kiu blokis ĉiujn vojojn el la teritorio kaj multe malhelpis la rifuĝantojn.

Banko-daiĵin lerte eligis el la disfalinta palaco, transiris per ŝipo la Edeno-riveron kaj forkuris, hazarde celante, li ankaŭ, la direkton de Armenio. Lin akompanis nur tre malmultaj lakeoj. Neĝo faladis pli kaj pli intense kaj fine ili tute malaperis en densan neĝon, subneĝigintaj.

La suno subite aperis, ĝi plifortigis la brilon kaj la varmon; la dika tavolo de neĝo ekdegelis kun granda rapideco. Baldaŭ poste sur la tero fariĝis preskaŭ kota maro. Penege Banko-daiĵin kaj liaj subuloj algrimpis sur apudajn arbojn. Multaj serpentoj kaj aliaj rampuloj ankaŭ rifuĝis sur arbojn, konkure algrimpante. Oni ek-aŭdis krion en la antaŭa direkto kaj kiam oni rigardis tien, oni trovis sur arbo Tokoĵo-hime'n, kiu agoniis ĉirkaŭvolvite de multaj venenserpentoj. Sur la sama arbo, iom malsupre de ŝi, oni trovis ankaŭ Tokoĵo-hiko'n, same en agonio pro minaco de serpentoj. Li aspektis palega kaj apenaŭ ne mortis.

En tiu ĉi momento, grandega serpentego aperis en la sudorienta ĉielo kaj ĝi rekte alflugis tien ĉi, okazi-

gante ĉirkaŭe nigrajn nubojn, kaj kun tondra bruego, kiel se la ĉielo kaj la tero frakasigus. Tiu ĉi estis la Okkapa Serpenteĝo, kiu naskiĝis el la miasmo de Adaru-hiko kaj Eba-hime, la gepatroj de la karnaj homoj. La serpenteĝo trempis sian voston en la kotajon, svingis ĝin rapidmove, sin rulante furioze tien kaj reen. Dank' al tiu skuado la akvo videble retiriĝis kaj malmultiĝis kaj en kelka tempo la tersupraĵo ekaperis. Ĉiu rampuloj rapideme malsuprenvenis de sur la arboj kaj sin kaŝis en la teron. Tiel Banko-daiĝin, Tokoĵo-hiko, Tokoĵo-hime kaj iliaj akompanantoj saviĝis el plej danĝera minaco. Nun ili vojiradis kune kaj post nelonga tempo atingis celitan Armenion. Subite en antaŭo aperis impona palaco, kiun oni ne rimarkis pli frue.

Cetere, Banko-daiĝin (Ŝionaga-hiko) estis tro konfuzita kaj senaplombigita por zorgi pri sia edzino Ŝionaga-hime, kiam li for-elkuris el sia palaco en Edeno, ĉe la akcidento; tiu ĉi edzo forĝesis kunpreni sian edzinon. Kaj kiel oni povis imagi, ke en la belega palaco, kiun oni ĵus trovis marŝante en la kamparo de Armenio, troviĝis jam la edzino de Banko-daiĝin, eĉ kun sia filo, kaj afable akceptis sian edzon kaj lian kunularon! Tio estas absolute malrezona...

Serio da katastrofoj kaj nerezoneblaj fenomenoj tiel okazadis. Ĉio ĉi tio estis ja pro tio, ke la tero perdis sian veran reganton kaj mallumo ekregis la spiritan mondon, malgraŭ ke la reala suno pendas sur la ĉielo, tiel ke malbonaj dioj kaj monstroj povis domini tute arbitre. De tiu ĉi tempo la dia mondo sur la tero ekstreme disordiĝis tagon post tago kaj fine prezentigis — mondo de diabloj.

Ĉapitro 211

Banko-daiĝin kaj aliaj difinis la subite aperintan palacon, kiel sian eternan loĝejon, decidis praktiki regadon

tie ĉi kaj respektivaj oficistoj-dioj ekokupis departamentojn. Krom la palaco, necesaj konstruaĵoj estis tute konvene pretigitaj iam, dum oni ne rimarkis tion.

Okazis hodiaŭ granda festo en tiu ĉi teritorio por beni la renovigitan administradon. Multaj dioj kolektis belajn kaj kuriozajn florojn en proksimaj kaj malproksimaj montoj kaj ornamis per ili la festenejon. Oni drinkis, kantis kaj dancis, rondirante ĉirkaŭ la palaco kaj tenante en la mano florojn.

Dum plena amuziĝado oni ekaŭdis supre en la aero iun voĉon, kiu kriis :

« Armenio ! Armenio ! »

La dioj unuanime suprenrigardis al la voĉo kaj jen vidis tie sur nuboj grandnombran di-armeon, kiun komandis Kunitokotaĉi-no-Mikoto, la jam forpelita prapatra Dio de la Tero. Frapite de majesteco kaj digno de l' armeo, la malicaj dioj sin platigis teren. Oni ial sentis humidecon sur sia tuta korpo ; en la sekvanta minuto ebrio foriris kaj tremo venis. Ĝuste tiam ia voĉo denove kraĉis vortojn :

« Blindulaĉoj ! Rigardu sub piedoj ! »

Ĉiuj dioj ekrigardis ĉe siaj piedoj kaj trovis, — ili kaŭris en kotaĵo !

— Tie ĉi devas esti apud la palaco de Armenio, — oni pensis kaj ĵetis nun rigardon al la palaco, kiu, miraĝo okazis, komencis sin levi iom post iom en la ĉielon... Tio, kion oni prenis ĝis nun por reala palaco, estis efektive nur miraĝo !

La miraĝa palaco leviĝis pli kaj pli alten kaj oni vidis en ĝi Banko-daiĵin kaj aliajn ĉefajn figurojn, kiuj ankaŭ altiriĝas en la aeron kun la konstruaĵo.

La forlasitaj surtere dioj plejgrade miris kaj konfuziĝis kaj komencis ĉirkaŭvagi en la kotaĵo, kiel senkonsciuloj. Sed efektive Banko-daiĵin, Jacuoo-daiĵin kaj

aliaj ankaŭ troviĝis inter ili kaj suferadis trempiginte en la kotakvon ĝis brusto; nur iliaj viziaj figuroj akompanis la levigantan palacon, kion oni vidis. Tamen senaplombigitaj dioj ne ankoraŭ rimarkis la veron kaj nur kredante, ke iliaj mastroj ĉieliris, domaĝploregis kaj sin ruladis freneze kaj eĉ subpiedigis siajn mastrojn per kotmakulitaj piedoj.

En tiu ĉi konfuza momento aperis la Okkapa Serpenteĝo el la direkto de Ural montaro kaj, okazigante nigrajn nubojn ĝi rekte alkuris tien ĉi. La di-armeoj ĝis nun vidiganta en la ĉielo ekmalaperis for kaj fulgonigra nubaro enkovris la tutan ĉielon, kiun tra-diskuris fulmofajroj, kiujn la Serpenteĝo ŝprucadis el sia buŝo. Terurega vido prezentigis.

En la komenco de la

Nova 1932-a Jaro

ni kore deziras

bonon, ĝojon kaj feliĉon al ĉiuj niaj karaj samideanoj, simpatiuloj, kunlaborantoj kaj legantoj.

Onisabro Deguĉi
Hidemaru Deguĉi
Uĉimaru Deguĉi

Oomoto-Propaganda Officejo
Universala Homama Asocio
Eŭropa Centra Officejo de Oomoto
Brazila Centra Officejo de Oomoto



EL JAPANUJO

La II-a Jaro

Japanana Luktado, "SUMOO"

Unu el plej familiaraj naciaj sportoj.

Inter Japana popolo prosperas sufiĉe multaj sportoj, propraj kaj eksterlandaj, kiuj respektive havas grandan nombron da subtenantoj kaj fanatikaj entuziasmoj. Sed «Sumoo» estas unu el plej familiaraj sportoj kaj ankoraŭ posedas multajn amantojn, kvankam la koroj de gejunuloj jam preskaŭ for de l' propraj sportoj japanaj kaj inklinaĝas al la nove enportitaj pli modernaj sportoj.

La vorto «Sumoo» havas signifon de «Luktado» kaj antikve ĝi nomiĝis «Ĉikara-kurabe» t. e. «konkurso de forto». Tial ĝi estas tre simila al «Ĵuudoo», tamen pli primitiva kaj komuna, kvankam ambaŭ devenis de l' sama motivo, ke du homoj batalu sen armiloj, ĉar la unua jam ekzistis en la pratempo, dum la alia komenciĝis nur de antaŭ 300 jaroj sub la nomo de «Jaŭara», nur ekzercite inter militistoj ĝis la Meiji Reformo.

Historieto de l' luktado.

Pri l' deveno de «Sumoo» ni havas jenan rakonton. En la tempo de l' imperiestro Suinin, «Kehaja de Taima» en Jamato-provinco kaj «Sukune de Nomi» en Izumo-provinco faris perkorpan bataladon en la kortego antaŭ la imperiestro, ĉar Kehaja tro fanfaronis pri l' supereco de sia korpa forto. Kaj la rezulto estis ke la fierulo estis mortigita de l' alia en la batalado.


Post tiu ĉi okazo, oni havis ĉiujare la feston de luk-

tado en la kortego. Baldaŭ aperis luktantoj inter korteganoj. En la epoko de Muromaĉi oni faris prezentadon de l' luktado, por varbi monon kaj oferi ĝin al sintoismaj temploj. Tiele la sporto iom post iom eniĝis en la popolamason kaj fine naskiĝis la profesia luktistaro la unuan fojon antaŭ ĉirkaŭ 300 jaroj. De tiam « Sumoo » kreskiĝis pli kaj pli vigle, ĉar ĉiu granda bienulo konkure invitis famajn luktistojn kaj rigardis lian venkon kiel sian familian kaj bienan honoron.

La Meiji Reformo antaŭ ĉ. 60 jaroj, tamen, donis al la profesia luktado grandan frapon kaj luktistoj tiam estis preskaŭ tute pereigontaj. Sed la granda imperiestro Meiji, avo de l' nuna imperiestro, donis honoron inviti ilin kaj observi la luktadon. Ĝi estis grandega instigo ne nur al profesia luktista rondo, sed ankaŭ al nacioj, kaj fanatika entuziasmo al « Sumoo » revekigis arde inter popolamaso.


La nuna stato de « Sumoo ».

Tiamaniere « Sumoo » reproduktiĝis en la Meiji-epoko kaj kelkaj grupoj de profesiaj luktistoj aperis tra la lando. Sed nuntempe ili grupiĝas al unu rondo, nomata « Tutjapana Luktista Asocio » kaj la asocio monopolas ĉian aferon pri « Sumoo ». Kompreneble simplan luktadon



Antaŭ momento de interbatalo. Staranta estas juĝisto.

perkorpan iuj ajn libere povas fari, sed profesiaj luktistoj nur monopole kaptas la korojn de l' popolamaso pro tio ke tiuj luktistoj profesiaj formas unu specialan socion en kiun ĝeneralaj homoj libere kaj facile ne povas eniri, ĉar ili nekompareble superas en la punktoj de korpforto, korpgrandeco kaj korpalteco.



Batalo.

Tiuj luktistoj profesiaj portas ligitajn kaphararojn kiel virinoj kaj tian strangan kutimon oni ne povas rimarki en grupoj de aliaj kategorioj.

La Tutjapana Luktista Asocio malfermas prezentadon de «Sumoo» unujare du fojojn en Januaro kaj Majo, dum 11 tagoj unu sezone ĝenerale en Tokio. Nuntempe pri l' prezentado oni disvastigas senpere de l' luktejo per radio tra la tuta lando kaj entuziasmigas ĉiujn amantojn.

La luktmaniero de «Sumoo».

«Sumoo» estas luktata interne en malgranda ringo sur la tera plataĵo, nomata «Dohjo» aŭ luktejo. Laŭvokke du luktistoj aperas sur la luktejo interne en la ringo kaj per la signo de juĝanto ekkomencas bataladon de «Sumoo». Ili estas tute nudaj, nur portante lumbajn zonojn tukajn. Tiu, kiu sukcesis faligi surteren aŭ elirigi eksteren el la ringo la antagoniston estas venkanto. Ĝenerale unu luktado bezonas kelkdek sekundojn, sed la batalado estas supersupoze interesa.


La organizo de l' «Sumoo» Asocio.

Al la asocio aliĝas kelkcent profesiaj luktistoj, el kiuj tamen nur kelkdek estas elektitaj laŭ siaj korpforteco kaj lerteco en luktado kiel «Maku-no-uĉi»

(luktisto inter kulteno: la nomo devenis de la fakto, ke la « Maku-no-uĉi » luktistoj nur estis permesataj eniri en la kultenon ĉe l' luktfesto en la kortego) kaj « Maku-ŝita » (subranguloj de « Maku-no-uĉi »).

Ili dividiĝas en du partoj t. e. orienta kaj okcidenta partoj, kaj ĉe ĉiu sezono tiuj ĉi partoj konkuras gajni pli grandan poentaron.

El tiuj de « Maku-no-uĉi » de ĉiu parto distingiĝas tri plej potencaj per la nomo de « Sanjaku » (tri oficuloj) kaj el ili plie la plej potenca nomiĝas « Oozeki », dua « Sekiŝake », tria « Komusubi ». Aliaj de « Maku-no-uĉi » krom tiuj tri potenculoj havas rangon de « Maegaŝira », en kiu ankaŭ ĉiu havas vicon laŭ sia potenceco. La rangojn kaj vicojn la asocio decidas laŭ la rezulto farita dum 11 tagoj en unu sezono kaj publikigas ĝin antaŭ kelkaj tagoj de la sekvanta sezono. La luktisto de l' rango « Oozeki » kiu povis tenadi la rangon daŭre por sufiĉe longaj sezonoj kaj distingiĝas speciale per sia forteco povas esti rekomendata al la honora rango nomata « Jokozuna », la plej alta rango de « Sumoo ». La rang-tenanto sinprezantas al rigardantaro ĉe ĉiu sezono ĉiutage, ornamante sian lumbon per ŝnura zono kaj brokata antaŭtuko, kiuj estas la simbolo de « Jokozuna ».



Sinprezentado de Jokozuna.

FEINO DE NEĜO.

— (JAPANA TRADICIO) —

En la regiono Eĉigo (nordokcidenta parto de la lando) iam loĝis unu maljunulo nomata Josaku, kiu sin okupis je arbohakado. Ĉe ĉi tiu arbohakisto laboris, kiel dungito, 18jara knabo, laŭnome Seikiĉi. Ĉiutage ili duope iris al monto por haki hejtaĵojn. Sur la vojo, kiun ili nepre devis paŝi por atingi la monton, kuŝis granda rivero; kaj ili transiris ĝin per boato.

Estis en iu tago de vintro. Kiel kutime, la maljunulo kaj la knabo laboris sur la monto. La de l' mateno nuba vetero produktis neĝon kaj ĉe l' vesperigo eĉ okazis forta ventego. La laborantoj rapidis malsupreniri la monton kaj atingis al la bordo de l' rivero. Sed bedaŭre tie oni ne povis trovi la boatiston, nek eĉ ombron de la ŝipeto, ĉar la boatisto jam foriris al sia hejmo en la transejo, supozeble pro timemo al forta neĝoblovado. Ili, tute konfuzitaj sed nun senhelpaj, devis noktigi en budo sur la riverbordo, kie troviĝis eĉ nenia fajrujo, sed nur regis malvarmego. Ili do kuŝiĝis sur la planko de l' budo kaj surmetis sur sin la pluvŝirmilojn por sin varmigi. Baldaŭ ekdormis la maljunulo laca pro l' laborado en la tago, dum la knabo Seikiĉi ne povis facile dormi. Forta neĝoblovo sin ĵetis kontraŭ la pordon kun granda bruo kaj ŝancelis la malgrandan budon. Furioza ondego de la rivero! Kaj laŭ la profundigo de la nokto malvarmeco pli kaj pli severiĝis. Seikiĉi dormetadis por kelka tempo, sed ekvekiĝis pro malvarmaj neĝeroj, kiuj surblovis lian vizagon. Al li ŝajnis, ke en la budo subite fariĝis lume. Li trovis la pordeton malfermita kaj jen virinan figuron en blanka kostumo. Ĝi sinklinis minace super lin kaj premis lian kolon per la manoj, eligante el la buŝo ion similan al blanka fumo. La knabo vane klopodis elgorgigi ekkrion de surprizo, ĉar tiam la stranga virino pli proksimiĝis preme de supre al lia vizago. Kaj kap-

tante la brakojn de Seikiĉi, baraktanta ekster si pro granda teruro, ŝi fikse enrigardis en la vizaĝon de la knabo, kun iom da koketo sur la pala vizaĝo. La virino murmuris al liaj oreloj:

— En tiu ĉi nokto mi venis vin mortigi... Sed kiel bela knabo vi estas! Nun mi ne kuraĝas rabi la vivon de tia belulo, kia vi estas. Tamen, vi memoru, se vi malkaŝos al iu ajn ĉi-noktan okazaĵon, tiam mi certe vin mortigos. Tion konservu en via cerbo!

Tion dirinte la virino leviĝis kaj rapidis foriri de la elirejo kun nenia bruo. Kiel risorto la knabo salte sin levis kaj rigardis eksteren, timeme malfermante mal-large la pordon; sed nenie li povis trovi la virinon en blanka vesto. Nur forta neĝoblovado furiozis ekstere en mallumo. Malforteme li fermis la pordon, kvazaŭ li estis kaptita de iu ombro, kaj falis malstreĉita sur la plankon. Li pensis en la koro, ke li estus vaganta en sonĝo kaj la blanka figuro, kiu al li vidiĝis stranga virino, estus lumo de la neĝo, falanta tra interspaco de la pordo. Sed post ĉio li estis en labirinto pri tio. Li do alvokis al la maljunulo Josaku, dormanta apud li sur la planko. Venis nenia respondo. La knabo tremetante etendis sian manon por veki la dormanton. Jen lia mano sentis kvazaŭ glacian malvarmecon ĉe la korpo de Josaku. La maljunulo estis mortinta.

En la sekvinta tagiĝo la neĝoblovado tute sin pafis for. Sur la kvieta fluo de la rivero la ŝipisto transvenis per la boato. Ĉe la enirejo de la budo la boatisto trovis la knabon sveninta apud la kadavro de maljuna Josaku. Li tuj flegis la svenanton kaj sukcesis reakiri la konscion al li. Sed rekonsciiginta Seikiĉi nenion parolis



pri la terura okazintaĵo en hieraŭa nokto, kvankam li estis suferigata de la figuro de l' stranga virino, kiu estis fiksita neforigeble en lia koro.

En iu vespero de l' sekvinta vintro, sur la revena vojo de la monto Seikiĉi ĝisigis vojaĝanton, kiu estis iranta antaŭ li. La vojaĝanto estis knabino bela, negrasa kaj altekreska. Kiam Seikiĉi alparolis al la knabino, ŝi sinturnis al li kun dolĉa rideto sur la lipoj. Bela knabina vizaĝo reliefata en la krepusko — ĝi, li pensis momente, havas ian similecon al tiu de la virino, kiu lin minacis en la neĝoblova nokto de la lasta vintro. Sed nun paroli kun ŝi estis por li pli multe ĝoje, ol pensi tion. Baldaŭ interparolado prosperigis inter ili, kiuj jam intime kuniris unu apud la alia. Seikiĉi sciigis, ke la vojaĝantino nomiĝas O-juki,[†] lastatempe perdis la gepatrojn kaj nun vojaĝas al Edo (malnova nomo de Tokio) por sin apogi al sia tiea parenco. Dum li aŭskultadis la konfeson de la vojaĝantino, li eksentis ian sopiremon al ŝi. Ankaŭ ĉe la knabino ŝajne estis same, ĉar oni povis konjektion per ŝia dolĉa parolmaniero. Kiam ili atingis la vilaĝon, ili jam estis tiel intimaj, ke ili trovis sin premantaj la manon reciproke. Post kelka tempo ili estis antaŭ la domo de Seikiĉi, sed li ne deziris disigi de la knabino. Li do proponis al ŝi preni iom da ripozo en lia domo. Ŝi konsentis lin post kelka hezito. La patrino de Seikiĉi, laŭ unua rigardo al la knabino, multe ŝatis ŝian virgulinecan detenigemon. Ŝi afable gastigis la vojaĝantinon per varmaj regalaĵoj, kaj prokrastigis al ŝi la vojaĝon al Edo. La patrino tiele sukcesis konduki la aferon al feliĉa edziĝo de sia amata filo.

En la kvinta monta vilaĝo kelkaj jaroj forflugis kiel sonĝo. Dume la patrino de Seikiĉi adiaŭis ĉi tiun mondon. O-juki ĉiam ankoraŭ restis en tia beleco kaj juneco, kian oni trovis en ŝi, kiam ŝi venis al tiu ĉi vilaĝo antaŭ kelkaj jaroj. Tia ŝia juneco vidigis kiel magia al la okuloj de kamparanoj, kiuj estis kutimigintaj je kadukiĝemaj vilaganinoj.

Senhalte fluis la tempo — dek jaroj. Estis en iu

[†] O-juki : juki signifas neĝon.



vespero de vintra tago. Ekstere furiozis neĝoblovado. En la domo de Seikiĉi, sinjorino O-juki sin profundiĝis en kudrado apud lampo. Seikiĉi enpensigis sidante apude de la edzino. Subite, kvazaŭ ekvekiĝis, li alparolis al la edzino:

— Kiam mi vidas vin kudrantan, kun lumo de la lampo sur la profilo, mi rememoras la okazintaĵon, kiun mi renkontis ankoraŭ en la knabeco de 18 jaroj. Tiam mi vidis tian belulinon, kia vi nun estas...

— Kie vi renkontis ŝin? Volu rakonti al mi pri tiu afero.

Ŝi petis al la edzo, kun iom klinita vizaĝo al la kudraĵo. Seikiĉi do ekrakontis al la edzino pri la okazintaĵo antaŭ dekkelkaj jaroj: la blanka figuro de la stranga virino, subita mortigo de maljuna Josaku ktp., ŝpinante teruran rememoron pri la noktigo en la budo sur la riverbordo.

— La vizaĝo de tiu virino estis tiel blanka kiel via. Por mi estis tre terure ŝin vidi. Eble ŝi ne estus homo; ankoraŭ nun al mi ne estas klare, cu ŝi estis virino en sonĝo, aŭ neĝo-virino.

O-juki subite deĵetis de la manoj la kudraĵon, sin levis kaj de supre rigardis akre la vizaĝon de Seikiĉi. Ŝi ekkriis:

Ĝi estis ja mi... mi, ĉi tiu O-juki. Tiam mi diris al vi, ke mi certe vin mortigos, se vi parolos eĉ iomete pri mi al iu ajn. Tamen mi ne kuraĝas vin mortigi per miaj propraj manoj, ĉar vi ja estas tre kompatema por mi. Sed nun mi jam neniel povas resti ĉe vi...

Laŭ mallaŭtigo de ŝia voĉo, kiel bruo de formalproksimiĝanta vento, ŝia figuro iom post iom malaperigis kiel fumo. En morgaŭa mateno vilaĝanoj trovis la kadavron de Seikiĉi sur la neĝo. (Trad: K. O.)

JAPANA KRONIKO

Granda manovro de la armeo.

De la 12-a ĝis la 14-a, Nov. 1931, speciala granda manovro de la armeo estis okazigata en prefektejoj Hukuoka, Saga kaj Kumamoto. Por ĝin supervidi la Mikado forlasis Tokion en la 8-a. Dum la manovro Li mem rajdis tien kaj ĉi tien en la batalkampo kaj vivadis kune kun la soldatoj. En la 15-a Li honoris la paradon per Sia revizio. Kaj post loka inspektado, la Mikado revenis al Tokio en bonega sano, la 21-an tagon.

Nova Inukai-Kabineto.



S-ro Inukai.

Lastan tempon Ŭakacuki-Kabineto rezignis. Kial tiu ĉi kabineto devis disfali, eĉ posedante absolutan multnombbron de l' deputatoj? La kaŭzo estas: Sub la konsidero de grava situacio de Japanujo en nuna tempo, S-ro Adaĉi, Ministro de Enlandaj Aferoj, deklaris la neceson de kabineto, kiu sin bazos sur la du grandaj partioj. Tial ke li estas aŭtoritata politikisto kaj samtempe Japanujo staras en tre grava situacio, despie la eĥo de tiu ĉi deklaro estis granda. Aperis aprobantoj kaj malaprobantoj. Ĉiuokaze tio kaŭzis skuegon en la politika kampo, precipe inter la ministroj kaj ankaŭ la amikaj partianoj. Do S-ro Ŭakacuki kaj aliaj ĉefaj personoj diversmaniere interkonsiligis kun S-ro Adaĉi dezirante, ke li forlasu tian entreprenon. Tamen li obstine asertis sian opinion. Do, post ĉio ĉefministro Ŭakacuki, sur sin ŝuldante la respondecon de « malkonkordiĝo de l' ministraro », faris rezignacion de sia Kabineto, en la 11-a de Nov.

Mikado tuj ordonis organizadon de Kabineto al S-ro Inukai, prezidanto de Seijuu-partio. Kaj li decidis organizi ne koalician, sed kabineton de sia partio unupa. Pri tio li parolis: —

« Per kunlabora maniero, oni tute ne povas ĝiskontente praktiki sian politikon, kaj krome tio ofte kaŭzas internan malordon.

Ĉar mi konsideras nunan nacistaton tre grava, mi prefere starigas plene firman kabineton sur unu partio kaj ni devas fari nian plejeblon por plenumi nian principon... »

La instala ceremonio de l' nova ministraro estis sole okazigata sub la ĉeesto de Mikado en la palaco, posttagmeze de l' 13-a de Dec.

Estas nature, ke S-ro Aĉaĉi kaj liaj sep samideanoj sinsekve eliris el Minsei-partio.

Tuta popolo koncentrigas la atenton al la politikoj de nova Inukai-Kabineto kaj al la agado de l' Aĉaĉi-partianoj.

Malpermeso de Oroeksportado.

Tuj post naskiĝo, la nova Inukai-Kabineto faris manifestacion de « malpermeso de oroeksportado », la 14-an de Dec., 1931. Estis malpli ol du jarojn antaŭe t. e. la 11-an de Januaro, 1930, Japanujo forigis la malpermeson de oroeksportado kaj liberigis sin de nenormaleco de la ekonomio post dektri longaj jaroj.

Tamen nun denove ni devis fermi la pordon de oroeksportado. Tion kaŭzas jenaj kvar kaŭzoj :

1e. Malmultiĝo de ororezervo, 2e. Eksplodo de l' Manĉuria Afero, 3e. Ekonomia paniko, 4e. La fakto, ke lastan tempon multaj nacioj sinsekve faras la malpermeson de oroeksportado.

Kompreneble plej ĉefa kialo estas la 1 a ; tamen oni devas noti ankaŭ la fakton, ke lastatempe tro prosperigis la « Dolaro-aĉetado ». En 1930 — 310.000.000 Jenoj kaj en 1931 — 320.000.000 Jenoj, resume 630.000.000 Jenoj da oro elfluis dum la du jaroj, post « forigo de malpermeso de oroeksportado ». Kaj Japanujo nun konservas nur malpli ol kvin cent milionojn da Jenoj da oro. Estas ja ekonomia krizo ! Por savi tiel malĝojigan staton nova Kabineto faris kun granda decido la « malpermeson ». En alilandoj la valoro de Japana Jenoj montris senantaŭekzemplan malkariĝon kaj enlande la akcioj eksterordinaran kariĝon, kio fine devigis fermi tutan borson de la lando. (16. 12. 1931.)

Kuraĝigo per morto.

En tondra adiaŭa aklamado de « Banzai », unu armea kompanio forveturis de Osaka-stacio al Manĉurio, la 13-an

de Dec. Efektive tio estis glora ekiro, tamen aliflanke lasis unu belan tragedion: — por kuraĝigi sian edzon veturontan al la batalkampo, unu virino sin mortigis.

En la nokto de la 12-a, t. e. antaŭtago de l' ekiro, S-ino Ĉijoko Inoue, edzino de Leŭtenanto, trapikis al si la gorgon per ponardo. En ceremonia vestaĵo, eĉ bele sin tutaletinta, ŝi aplombe mortigis sin kun forta deziro, ke ŝia edzo leŭtenanto povu batali plejeble, neniom lasante la koron al la edzino en la hejmo. Vere solena estas ŝia lasta momento! Tiamaniere ŝi finis junan vivon de 21 jaroj, kiel kara viktimo de nacia amo, kaj forte kuraĝigis sian edzon per « adiaŭo de morto ».

La edzo leŭtenanto Inoue, petinte al sia amiko bonarangi ĉiujn aferojn pri la mortintino, vigle forveturis al Manĉurio kune kun sia bando.

Je la 11-a horo matene, de la 15-a, Decembro, ŝia funebra ceremonio estis prospere okazigata en Osaka. La ceremoniejo estis plenigita de kelkdek miloj da ĉeestantoj — parencoj, gekonatuloj, grupaj reprezentantoj ktp. kaj de sennombraj kondolencoflagoj kaj floroj oferitaj al ŝia nobla animo.

Infano 2 jara legas jurnalon.

Keiĉjo naskiĝis, kiel la unua filo de gesinjoroj Ocubo en Nagasaki-prefektejo, la Novembron de 1929. De la aŭtunoj de l' lasta jaro (nome post unu jaro de l' naskiĝo) iom post iom ŝi ekkomencis legi « japanan alfabeton », se tamen kun malfacileco. Kaj en la lasta tempo la infano, estante ankoraŭ en la aĝo de nur 2 jaroj, kriiĝis kapabla paroli anglan kaj ankaŭ ĥinan lingvojn, kaj kiel ĉiutaga laboro, Keiĉjo ŝate legadas jurnalajn. Aŭdinte tion, ĉiuj urbanoj miregas e tiel eksterordinara kapableco de l' infano.

Teatraĵo de teatraĵo.

Estis unu dimanĉa posttagmezo de Novembro. Teatro « Kadoza » en Osaka prezentis teatraĵon de la « Kapitano Nakamura-Afero ». (Antaŭ Manĉuria Afero kapitano Nakamura kaj kelkaj japanoj estas kruele mortigitaj de ĥinaj soldatoj en Mongolujo.) Prezentiĝis la sceno de kruela pafmortigo: laŭ la ordono de komandanto Kuan-Yühêng, ĥinaj soldatoj pafmortigis Kapitanon Nakamura kaj Sergenton Isugi, kaj ili estis forlasantaj la lokon kun aroganta mieno... Jen tiam subite unu rigardanto supren-

saltis sur la scenon kaj forte pugnobatis la bruston de aktoro, kiu ludas la rolon de ĥina komandanto. Do en la teatro okazis granda tumulto. Inspektoro-policano tuj aĵkuris: — « Kion faras vi, diablo! Tiu ĉi estas teatraĵo... » kaj apenaŭ kvietigis lin, kiu faris tian konduton ekscitite pro troa indigno kontraŭ la ĥinaj soldatoj.

La sekvinta prezentaĵo estis satiro-teatraĵo. Unu viro superpotencas per sia riĉaĵo, turmentas malriĉulojn, venenas la socion.... Tial por forpuŝi lin, granda demonstracio-procesio de laboristoj almarŝis al la scenejo. Rigardante tion inspektoroj-policanoj, trosentemaj pro ĵusa tumulto de la pugnobato, erare komprenis, ke efektiva demonstracio certe eniris en la teatron. La policanoj tuj komencis aresti la laboristoj-aktorojn. Denove en la teatro tumultigis. « Estu vi prudentaj! Tiu ĉi estas teatraĵo. Ili estas aktoroj... » Por tiu ĉi fojo rigardantoj detenis la policanojn. Tiamaniere oni laŭvice faris veran prezentaĵon.

Ekspozicio de Anti-japanaj Ĥinaj Afiŝoj.

Depost la Manĉuria Afero diversaj okazaĵoj koncernantaj al Manĉurio estas okazigataj tra la tuta Japanujo: « Parolado pri Manĉuria problemo », « ekspozicio de anti-japanaj afiŝoj », « varbado de monofero por savi gefratojn aŭ konsoli niajn soldatojn en malvarmega Manĉurio » ktp.

Lastatempe la mondo pli kaj pli komprenas la justecon kaj cirkonstancon de Japanujo, veran staton de de Ĥinujo.

Antaŭ dek kelkaj tagoj mi (skribanto) vizitis ekspozicion de anti-japanaj afiŝoj. En la ekspoziciejo estas elmontritaj multe da materialoj:

(1) Afiŝoj — vere ĥinkarakteraj, eĉ tre infanajaj, afiŝoj de karikaturaĵo kaj litero. Rigardante ilin mi miris la lertan artifikon de ĥinoj. (2) Senfundamentaj artikoloj antijapanaj, skribitaj de ĥinaj ĵurnalistoj. Oni rimarkis absurdon inter ĵurnalaj artikoloj kaj fotografiaĵoj, fabrikitaj kun intenco. (3) Antijapanaj presajoj, lernolibroj de elementa lernejo pri geografio, historio, ekonomio ktp.

Utiligante tiamaniere ĉiujn okazojn kaj rimedojn, ĥina tielnomata gvidantaro agitis kaj agitas la generalan senprudentan popolamason kaj per lerta propagando trompas la mondon.

(H. Jamakaŭa)

ALEKSANDRO PETOFI

LA AVO

El la hungara originalo tradukis:

L. Rereips.

(1)

Estis kruele malvarma vintra vespero. Tiel tremadis kaj frostotremis la kompatindaj nudaj steloj, ke oni imagis aŭdi ilian dentkrakadon, el iliaj okuloj oni povis legi, ke ili pensadis: kiom multe pli bone estus vivi sur la tero kiel paŝtisto sub varmiga paŝtistpelto ol senveste brili supre en malvarmego!

La vespera sonorado forsonis, en la tuta vilaĝo neniu estis surstrate, krom la maljuna sonoristo, kiu el la preĝej-turo rapidis hejmen. Subliaj piedoj krakadis la frostiĝinta neĝo, sed la hundoj ne bojis je li, aŭ tial ĉar ili konis lin, aŭ tial ĉar pro la malvarmego ili maldiligentis malfermi siajn buŝojn.

Kiel feliĉa estas, kiu havas varman ĉambron, en tia vetero, sed multe pli feliĉa estas, kiu ne sola, sed kun sia familio varmiĝas!

Kaj multaj tiaj feliĉuloj vivas en la vilaĝo, sed neniu estas pli feliĉa ol Petro Pergo! Pli ol unufoje li mem diris, ke en la tuta mondo kun nenies sorto li interŝanĝus la sian. Sed li ne estus meritinta la benon de Dio se li ne estus kontenta, ĉar kun naŭ familianoj li sidas en varma ĉambro, ĉe servicita tablo.

Por vespermanĝo estis servicite, ili jam estis altabligitaj! Ĉe la supra fino de la tablo sidis la maljuna Petro Pergo, apud li sidis lia vivkunulino; maldekstre ilia filo, Mikaelo kaj ties fileto, la okjara Peĉjo; dekstre de la gemaljunuloj estis tri sidlokoj, sur la unua sidis la naŭjara Katanjo, sur la tria la sesjara Elinjo, la du filinoj de Mikaelo kaj inter ili la patrino de la tri infanoj, la edzino de Mikaelo.

Ĉe la malsupra fino de la tablo estis servicite por du geservistoj, por la servistino kaj la staloservisto. Sia nomo estis Maria kaj lia Francisko. Kiam la mastrino metis la supon sur la tablon, ĉiuj stariĝis kaj diris la autaŭmanĝan preĝon. Poste ili residiĝis kaj ĉerpis el la supo. Tiam oni frapis sur la pordo, la hundo ekbojis kaj

knaba voĉo kriis en la ĉambrojn :

Venu eksteren, ĉar mordos min la hundo!

— Kiu povas esti? demandis la edzino de Mikaelo.

Ĉu vi ne rekonas lian voĉon, mia kara patrino? Li estas Steĉjo, la filo de miaj bapto-gepatroj Andreo Kiŝ! diris Katanjo.

— Vere li estas, diris la patrino, Maria iru eksteren por enkonduki lin.

Maria ekstaris, tuj poste ankaŭ Francisko stariĝis.

— Francisko! diris Mikaelo.

— Kion vi deziras, mia mastro? demandis la staloservisto.

— Restu nur sidanta, mia kara filo, daŭrigis Mikaelo ridetante bonhumore, nur restu sidanta. Kial vi ambaŭ penus? ho granda fripono estas nia Francisko; kiel volonte li irus post ŝi, por povi ĉirkaŭbraki ŝin! Kial vi irus post ŝi? ŝi ne amas vin.

Certe ŝi amas min! mi scias tion, pensis Francisko kaj ruĝiĝante li residiĝis sur sian lokon, ĉar lia mastro divenis, kial li volis eliri.

Dume Maria enkondukis la knabeton.

— Do kion bonan vi alportis, mia knabeto? oni demandis lin.

Dum unu spirpreno li respondis jene:

— Miaj gepatroj salutas mian baptopatron kaj mian baptopatrinon, mian maljunan baptopatron kaj mian maljunan baptopatrinon, ke vi ĉiuj venu al ni por vespermanĝi, ĉar ni buĉis porkon.

— Ĉu vi buĉis porkon, mia knabo? demandis la edzino de Mikaelo.

— Jes, baptopatrino. Ĝi pezis okdek kvintalojn kaj unu kilogramon.

— Eble nur unu kvintalon kaj okdek kilogramojn?

— Sed tio estas tute egala, respondis la knabeto, ĝian voston mi jam manĝis... kaj pro tio tiel forte batis sur miajn fingrojn mia patrino, ke ankoraŭ nun ili brulas.

— Tion meritas la frandema knabo, interdiris Peĉjo. Ja mi ne estas frandema.

— Vi ne? respondis la atakita Steĉjo, sed paske vi ŝtelis mielon, ĉu ne?

— Kiam...?

— Vi simulas, kvazaŭ vi ne scius, dum pasko.

— Sed Steĉjo paske ni ne havis mielon, ĝustigis lin Katanjo kun serioza vizaĝo.

— Lasu, miaj knaboj, diris pacige la edzino de Mikaelo, vi ambaŭ estas bonaj knaboj, unu estas pli bona ol la alia, nur ne interbatiĝu. Diru Peĉjo al viaj gepatroj, ke ni tre dankas ilian bonvolon, sed ni jam vespermanĝis.

— Tio faras nenion, respondis Steĉjo, ĉar miaj gepatroj ordonis

al mi, ke mi ne foriru de ĉi tie ĝis vi venos. Ili diris, ke sen vi oni ne komencos la vespermanĝon, eĉ se oni devos atendi ĝis morgaŭ.

— Do, kion ni faru? demandis la edzino de Mikaelo.

— Nur iru miaj gefiloj, diris la maljuna Petro, vi ankaŭ iru, mia kara edzino. Mi restos hejme kun la infanoj.

— Ne mia kara edzo, respondis lia edzino, vi iru kaj mi restos hejme; rememoru: mi estis, kiu ĉeestis la geedziĝan festenon antaŭ kelkaj tagoj.

— Sed tie ni estis ambaŭ, mia anĝelo. Ĉu vi ne rememoras?

La gemaljunuloj dum longa tempo diskutis: kiu ĉeestis la geedziĝan festenon kaj kiu ne? kiu iru nun kaj kiu ne? ĝis finfine ili interkonsentis, ke nun iros la avino kaj la avo restos hejme kun la nepoj. Dum la irontoj surpronis peltojn, la malgranda Steĉjo tiris sin al la malgranda Katanjo kaj mallaŭte demandis ŝin:

— Katanjo, ĉu vi ne venos?

— Mi ne povas iri, respondis la knabineto, ĉar mi devas pretigi la liton por la ekdormonta Elinjo.

— Hej, kiel mi bedaŭras, tuj mi iĝus pli bonhumora, ni dancos se vi venos; eĉ ciganoj estos tie, tiel pripensu!

— Ne timu Steĉjo, ni dancos dum nia geedziĝa festeno.

— Certe ni dancos, sed post longa tempo, mia trezoro, eble nur post unu jaro.

— Eble nur post dujaroj. Kiom aĝa nun vi estas?

— Dek, kaj vi Katanjo?

— Naŭ.

— Sed eble tiam ni ne devas atendi du jarojn.

— Eble ne tute.

Dume Mikaelo kaj lia edzino surpronis siajn peltojn kaj la avinon zorge ili kovris per ĉio kaj ili foriris nur post kiam la avo per propraj okuloj ekzamenis: ĉu bone estas vestigita kaj ĉu ne varmumos lia kara vivkunulino, kiun li ankoraŭ nun tiel arde amas kiel antaŭ tridekkvin jaroj, kiam li edziĝis kun ŝi. Maria iris post ili por fermi la pordon; Francisko ankaŭ ŝteliris post ŝi kaj en la kuirejo li atendis ŝin. Belegaj estaĵoj estis tiuj du geservistoj. Ili tre harmoniiĝis unu al la alia! Francisko estis arda bruna knabo kaj Maria malsovaĝa blonda knabino. Li estis dudek-, ŝi estis dek ses jaraĵ. Ili ambaŭ estis bonaj laboristoj. Pro tio tre amis ilin la mastro, la mastrino, kvazaŭ siajn proprajn gefilojn. La gemastroj promesis al ili, ke je la geedziĝo ili ricevos tiom da litaĵoj, kiom ili bezonos kaj krom tio melkbovinon, kun bovido kaj ili pagos ankaŭ la elspezojn de la geedziĝa festeno.

(Daŭrigota)

NIAJ REPRESENTANTOJ

- Francujo **Etropa Centra Oficejo de Oomoto,**
S-ro Koogecu Nišimura,
1, rue Felix-Faure, Paris (15e).
- Brazilo **Brazila Centra Oficejo de Oomoto,**
S-ro Masajoŝi Kondo,
Rua Travessa Joao Cezario N 15,
Penha S. Paulo, Estado de S. Paulo.
- Bulgarujo S-ro Varčo Jovčev,
vilaĝo Kaŝlite, Gabrovsko.
- S-ro Ivan Kirov,
Popska, 484 Sliven.
- S-ro Georgi Dončev,
str. Gurko 375, Tirnovo.
- S-ro Serafim Vitanov,
(vagonarestro,) gara Dup-
nica.
- S-ro Atanas Nikolov,
str. Car Ivan Ŝišman. 19,
Bulgaa.
- Ĉeĥoslovakujo S-ro Franz Minfler,
Trautenau Weigelsdorfer-
strasse 13.
- S-ro Rudolf Burkert,
Kalvariengasse 34-IV, Nie-
mes.
- S-ro Sofie Cipera,
Pilsen V. Zahradni 58.
- S-ro Rudolf Gardelko,
Frystat,
- Germanujo S-ro Kurt Wuensche,
Augustenstr. 17, Leipzig-R.
- S-ro Anton A. Ehm,
Zittau. Sa., Stefanstr. 11.
- S-ro Gottlieb Strofsner,
Munchen S. 50. Bavarujo,
Dietramszellestr. 10. 21.
- S-ro K. O. Schmidt,
Brixstr. 8 a, Flensburg.
- S-ro Friedrich Bachmann,
Bahnhofstr. 5/1. Heilbronn.
- S-ro Ludwig Merkel,
SternApotheke, Ahlen i,
Westf.
- Hindujo S-ro Liem Tjong Hie,
Semarang, Karangtoeri 66,
Java.
- Hispanujo S-ro Francisko Miralles,
Hellin (Albacete).
- Hungarujo S-ro Paŭlo Balkanyi,
Hajos ucca 15, Budapest.
- Ĥinujo S-ro Sh. M. Chun,
N.Y.M.S. Lunghuwa, Shan-
ghai.
- Italujo S-ro Luigi Minnaja,
Via Calatafimi 10, Roma 21.
- S-ro Giovanni della Savia,
Viale delle Ferriere. 9/II,
Udine.
- S-ro Francesco Donadelli,
Via 2. ruote No. 7, Vicenza.
- Jugoslavujo S-ro Marko Dominis,
Sinj. (Dalm.)
- Litovujo S-ro A. Paskevicius,
Kaunas, Ukmerges pl. 53-b.l.
- S-ro Andrius Borkanskas,
Pokrugaus g-ve 7 Nr. Rad-
viliškis.
- Persujo S-ro Mohammed Ruhani
Recht.
- S-ro Darius Nemseči,
Tabriz.
- Polujo S-ro Adolf Oberrotman,
Varsovio, Krak—Przedm 10.
- S-ro Denysiuk Les,
Kolomea.
- Rumanujo S-ro Eŭgeno Kormoŝ,
Chiend-Kovend, Dept. Turda.
Transilvanio.
- Svisujo F-ro Irene Molinari,
(instruistino,) en Muralto (Locarno)
- S-ro Karl Jost,
Stolzesstr. 7, Zurich 6.
- Usono S-ro John Lester Lewine,
150 E. 72 nd. St. New York
City.
- S-ro K. A. Suzuki,
Orange Petroleum Co. Ora-
nge (Texas)

« La reprezentantoj rajtas kolekti abonkotizon. »

KIAL

OOMOTO INTERNACIA

defendas tiom arde Esperanto'n?
ĉar

Esperanto

prezentas nevenkeblan forton, samkiel la
H o m a r a n i s m o .

Tutmondanaro, aliĝu al ni, sendante vian abonkotizon
(3 sv. aŭ 15 fr.fr.) al:
S-ro K. Nišimura, 1, rue Felix-Faure, Paris (15e).
Petu senpagan specimenon!

Aliĝu senprokraste
al la 10-a jubilea eldono de

BES-Adresaro

de Esperantistoj el ĉiuj landoj
kiu

celas kolekti adresojn de ĉiuj Esperantistoj kaj de ĉiuj Esperanto-entreprenoj. — Praktike kaj modele aranĝita helpilo bezona por ĉiu Esperantisto, kun portretoj kaj registro laŭfaka eĉ laŭinklina, tiel ke ĉiu tuj trovas la deziratan adreson! — Simpla aliĝo 0.50 Fsv (0.25 Jenio aŭ 2 respondkuponoj), aliĝo kun adresaro 1 Fsv, kun adresaro kaj portreto 1.50 Fsv. Anonca paĝo 25 Fsv. — Detalan prospekton plezure al ĉiu sendas la eldonanto:

BES (Bohema Esperanto-Servo),
Potstejn, Ĉeĥoslovakujo.

ENHAVO

— Motoj de Oomoto	1
— Oomoto - movado	2
— Ĉe la Jarkomenco	3
— Sankta Skribo	8
— La Ekspozicio de Belartaĵoj	9
— Unuigo de la Aziaj Gentoj	12
— Ŝancelo de la Tera Akso	15
— EL JAPANUJO	
Japana luktado, « Sumoo »	22
Feino de Neĝo	26
Japana Kroniko	30
— La Avo (Literaturo)	34
— Niaj Reprezentantoj	37

El la Redakcio

◆ Antaŭ ĉio ni faras Novjaran saluton al niaj karaj legantoj kaj petas multe pli grandan subtenon ankaŭ en ĉi tiu jaro. ◆ La novelo «La avo» en ĉi tiu numero estas sendita de S-ro L. Rereips. Japanan luktadon «Sumoo» en «Japana kolono» ni eltiris el «Nagasaki-Seinen», kun permeso de ĝia redaktoro. ◆ Instruistino Julie Šupichová en Praha tradukis sialingven la artikolon «Silentu la Ligo kaj Usono», kiu aperis en «El Japanujo» de Oktobra numero de nia revuo, kaj publikigis ĝin en «Národní Politika», plej legata ĵurnalo de Ĉeĥo. Koran dankon por la afableco de Instruistino Julie.

Reklamo: Tuta pago 20 sv. fr. Duona pago 10 sv. fr.

Anonceto: Unu linio — du respondkuponoj. Dumduonjara enpresado — kvarobla de unufoja prezo.

定價 壹部 貳拾錢 壹ヶ年 貳圓四拾錢

昭和七年一月一日印刷 昭和七年一月一日發行

編輯發行印刷人 瓜生健吉 京都府南桑田郡龜岡町荒塚字内丸一

印刷發所行 第二天聲社 (替振大阪75917番) 全



Heroldo de Esperanto en 1932

Refoje pliperfektigata

NIAJ ĈEFAJ RUBRIKO KAJ ALDONOJ:

Esperanto vivas (Kroniko)
Kreskas nia literaturo (Bibliografio)
Parolas la leganto (Libera Tribuno)
De mardo al mardo (Tra la mondo)
Niaj leteroj el la tuta mondo
Inter mikrofono kaj anteno (Radio-paĝo)
La regno virina (Virina paĝo)
Sur la kvin linioj (Muzika paĝo)
La romana paĝo enhavos en 1932 romanon el la plumo de fama nuntempa hispana aŭtoro.

NOVE ARANĜOTAJ:

La bela mondo (Turisma paĝo)
La strigo (Paĝo por literaturo kaj arto)
Nia gazeto (Aldono por la junularo)
Nia lingvo (Survoje al konsilanta gramatiko)
Humoro, distro, ludo.

Ĉiun duan semajnon unu premia tasko!

Ĉiun duan monaton unu enketo!

Nia Librofako eldonas valorajn verkojn, originalajn kaj tradukitajn el diversaj lingvoj. Speciale rekomendindaj estas la verkoj de E. M. Remarque: **En okcidento nenio nova kaj La vojo returne**, krom la unua mondhistorio originale verkita en Esperanto de H. Haefker sub titolo: **Jarmiloj pasas**. En nia stoko troviĝas ankaŭ ĉiuj nuntempe haveblaj pli gravaj verkoj de la Esperanto-literaturo. Petu senpagan specimenon de Heroldo kaj nian senpagan ilustritan Librokatalogon!

Heroldo de Esperanto

Brüssler Str. 94, Köln (Germanujo)

